

februaro 1969

62-a jaro

n-ro 759 (2)

esperanto

oficiala organo de

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)

nieuwe binnenweg 176, rotterdam-2, nederlando - red. v. sadler



**SEMAJNO DE INTERNACIA
AMIKECO 16-22 FEBRUARO**

Vi trovos

en tiu ĉi numero de nia organo varian intelektan nutraĵon: ekde principaj demandoj de organizo (la ĉefartikolo de prof. Lapenna) ĝis la rememoroj, jam ne plu precize kontroleblaj, de pioniro, kiu persone renkontiĝis kun du grandaj personecoj de nia jarcento: Zamenhof kaj Lenin. Koincido estas la raporto (p. 23) pri alia pioniro, kiu proksime rilatis al alia eminentulo de la rusa historio: Tolstoj, kies favoraj deklaroj pri Esperanto estas multe pli konkrete dokumentitaj, ol tiuj de Lenin. Favoraj opinioj de eminentuloj estas unu batalilo en la manoj de niaj informaj fakoj. Alia estas la prelegvojaĝo, kaj sur p. 29 ni raportas kiel ekzemplon aparte sukcesan vojaĝon lastatempan. Alispeca sukces-rakonto havas polan fonon kaj aperas sur la antaŭa paĝo. Fine, tiuj, kies interesoj estas unuavice surbretaj, trovos la plej aktualajn libro-novaĵojn sur paĝoj 22-23 kaj 31-33.

Enhavo

- 21 La senco de la nunaj elektoj (Lapenna)
- 22 Startis nova eldonejo
- 23 Progresas P.I.V.
- 23 Seminario en Köln
- 23 Victor Lebrun en Moskvo
- 23 Forpasis Newell (nekrologoj Newell, Lie)
- 24 Lenin kaj la Internacia Lingvo (Ĉaĉe)
- 28 Ekzemplo urbeto
- 29 Prelegoj en Svedujo pri Homaj Rajtoj
- 30 Pri pano kaj pri Mona Liza (letero)
- 30 Unesteno por la amhara lingvo
- 31 Recenzoj
- 33 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj)
- 34 Loke – fake – persone (mallongaj novaĵoj)
- 34 Mortis la redaktoro de Nederlanda Esperantisto
- 35 La Juna Vivo
- 36 54-a Universala Kongreso, Helsinki, Finnlando, 1969
- 37 Esperanto en radio
- 37 Memoriga kalendaro
- 38 Oficiala informilo n-ro 420
- 40 Anoncetoj

La kovrilo

Infanoj el sesdeko da landoj vizitas la internacian lernejon de Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko, kie ili lernas, krom la oficialaj studobjektoj, ankaŭ internacian amikecon. Ĉi-jare por la unua fojo miloj da infanoj kaj plenaĝuloj tra la mondo festos per salutoj, donacoj, kunvenoj kaj specialaj aranĝoj la Semajnon de Internacia Amikeco, de la 16-a ĝis la 22-a de februaro. La Semajno, lanĉita de UEA antaŭ nur kelkaj monatoj, jam vaste populariĝas kaj diskoniĝas en kaj ekster la Asocio.

(Foto: Usona Informa Servo)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Apcras monate (escepte de aŭgusto).

Redaktoro: D-ro V. Sadler.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 18,75 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 25,— gld.). Unuopa ekzemplero: 1,— gld.

Banko: Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Girkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-6.

Legantoj en ĉirkaŭ 80 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano por diskonigo de la agado de UEA: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Generala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blueskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

Estrarano pri turismo: S-ro M. Jaumotte, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

Estrarano pri lernejoj: S-ro J. Toczyski, skr. p. 57, Gdańsk 1, Polujo.

Estrarano pri financoj: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj: D-ro Peter Zlatnar, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, Germanujo.

LA SENCO DE LA NUNAJ ELEKTOJ

Laŭ la Statuto, la elektoj por la Komitato, Estraro kaj aliaj organoj de UEA principe okazas ĉiun trian jaron. En Madrid la Komitato mallongigis sian mandaton, tiel ke la novaj elektoj okazos jam antaŭ la Kongreso en Helsinki, resp. en Helsinki mem, anstataŭ en 1970. Tiun decidon diktis la urĝa bezono renovigi kaj plijunigi la gvidajn instancojn de la Asocio por ebligi ilian ankoraŭ pli efikan laboron en la aktuala lingva-politika situacio en la mondo.

Kiel raportite en la septembra numero de "Esperanto", la starpunkto de la Komitato en tiu ĉi afero estas ligita al la 15 fundamentaj tezoj, kiujn la subskribinto formulis surbaze de la ideoj esprimitaj en la inaŭgura parolado, kaj kiujn la Komitato poste unuanime akceptis kiel ĝeneralan gvidlinion por la agado de UEA, nome de ĉiuj organizaĵoj kaj unuopuloj, kiuj ĝin formas.

Diverseco en unueco

Unu el la tezoj koncernas la organizan strukturon de UEA. Asocio reprezentanta mondan movadon kaj pretendanta universalecon en horizontala (teritoria) kaj vertikala (faka) sencoj ne povas kontentige funkcii, se ĝi ne kunligas en sia organiza strukturo internaciecon kaj demokratecon kun la plej alta grado de efikeco. Realigi la idealon de unusola lingvo por internacia komunikado certe ne estas simpla afero. Ĝi postulas konscie planitajn agadojn por diskonigo de la lingvo, por rompado de antaŭjuĝoj, favorigo de la publika opinio, instigado al lernado, publikigado de lernolibroj kaj vortaroj, daŭra riĉigado de la lingvo per nova kultura enhavo, kreo de ĉiaspecaj praktikaj servoj kaj multaj aliaj. Evidente, kelkaj el la konkretaj taskoj en tiu ĉi kompleksa laboro povas esti plej sukcese plenumitaj sur loka aŭ regiona nivelo, pluraj nur en landaj kadroj, dum la efektivigo de aliaj neprigas monde reprezentajn centrajn organojn. UEA prezentas tiun vastan kadron, kiu kunigas la diversajn erojn en unu granda unueca tuto sen perdigi al unuopaj partoj ilian utilan sendependecon en agadoj postulantaj memstarecon. Unueco en diverseco estas la baza principo, el kiu sekvas la tuta organiza strukturo de UEA.

Ideala Komitato

La tri ĉefaj organoj de UEA estas la Komitato, la Estraro kaj la Centra Oficejo. La Komitato sendube estas la plej grava el ili. Ĝi decidas pri la ĝenerala agado de UEA, pri la laborplano kaj pri programoj por specialaj celoj; pri aliĝo de landaj kaj fakaj asocioj aŭ pri kontraktoj kun la lastaj; pri regularoj, buĝeto kaj financoj. La Komitato ankaŭ elektas el sia mezo la Estraron, kiu siavice nomas

la Direktoron de la C.O., elektas la redaktorojn, realigas la decidojn de la Komitato kaj plenumas aron da aliaj taskoj.

La Komitato reflektas la strukturon de la Asocio. Ĝi konsistas el komitatanoj A/, kiujn elektas la aliĝintaj landaj kaj fakaj organizaĵoj proporcie al la nombro de siaj membroj (unu komitatano A/ por ĉiu milo). La komitatanoj B/, kiujn elektas la ĉefdelegitoj kaj delegitoj el internacia listo de kandidatoj, reprezentas la individuan membraron. Oni elektas unu komitatano B/ por 250 delegitoj. Fine, la komitatanoj A/ kaj B/ kune povas alelekti la t. n. komitatanojn C/ ĝis kvarono de sia propra nombro por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj aparte kompetentaj por diversaj taskoj. Senkonsidere al la kategorio, ĉiuj komitatanoj havas absolute egalajn rajtojn kaj devojn.

Kiel oni vidas, la Statuto mem garantias, ke internacieco kaj universaleco esprimiĝu en la Komitato. Tio aŭtomate kaŭzas, ke en ĝi estas reprezentitaj ankaŭ diversaj civilizoj, kulturoj kaj lingvoj; malsamaj ekonomiaj, sociaj kaj politikaj sistemoj; pluraj filozofiaj aŭ religiaj konceptoj. Ju pli da varieco tiurilate, des pli bone por tiaspeca organo, ĉar ĝuste tio ebligas al ĝi kiel tuto preni en konsideron la mondan realaĵon en ĉiuj ĝiaj ĉefaj aspektoj.

Necesas junaj fortoj


Kion la Statuto ne povas preskribi, sed kio estas esence grava por pli efika laboro de la Komitato, estas io alia. Necesas atingi, ke en ĝi troviĝu ne nur pli aĝaj personoj jam spertiĝintaj en la laboro por la Internacia Lingvo, sed ankaŭ promesoplenaj junaj fortoj. Plue, ni bezonas en la Komitato kvalifikitajn specialistojn en diversaj fakoj; personojn kun prestiĝaj pozicioj en siaj landoj aŭ internacie; reprezentantojn, kiuj, pro siaj funkcioj en la landaj aŭ fakaj organizaĵoj, povas kaj volas prizorgi, ke la decidoj de la Komitato estu realigitaj sur ĉiuj niveloj; membrojn, kiuj pretas ne nur diskuti kaj voĉdoni, sed ankaŭ transpreni kaj konsciencie plenumi konkretajn taskojn. Certe, neniuj rajtas instrukcii, kiun oni kandidatigu aŭ elektu, sed oni sendube povas atenti al la fakta celo de la nunaj elektoj: havigi al la Asocio Komitaton, kiu ja estos homogena koncerne la realigon de la Laborplano, sed samtempe ankaŭ kiel eble plej varia rilate la aĝon, fakecon, kvalifikojn, personan prestiĝon en diversaj medioj. Membreco en la Komitato ne estas ia honoro, sed respondeca funkcio, kiu postulas personan sindeviĝon kaj multe da laboro.

La Asocio urĝe bezonas ĝuste tian Komitaton. De la nunaj elektoj dependas, ĉu UEA havos ĝin en Helsinki aŭ ne.

Ivo Lapenna

STARTIS NOVA ELDONEJO

Ambiciaj planoj de "T.K."



Plenrajte ridetas d-ro Italo Chiussi (dekstre), tradukinto de La Nobla Korano en Esperanton. Post maratona laboro kaj temporaba serĉado de eldonejo, li vidos la fruktojn de sia sinde-diĉo aperi ĉe la nova eldonejo T.K. en Danujo. Sur la foto d-ro Chiussi konversacias kun Sir Muhammad Zafrulla Khan, juĝisto de la Internacia Kortumo en Hago kaj eminenta aŭtoritato pri Islamo.

Kion havas komuna: kolekto da leĝeraj anekdotoj kaj ŝercaj versaĵoj, kaj la fundamenta verko de unu el la grandaj religioj de la mondo? Respondo: ambaŭ aperas en la eldonplano de Eldonejo TK, ĵus lanĉita en Danujo. La literoj TK signifas: Torben Kehlet, kaj en la manoj de tiu juna aktivulo de la dana Esperanto-movado troviĝas la nova entrepreno.

Serio "Oriento-Okcidento"

Kolektantoj de la elstaraj verkoj, kiuj aperas en la serio Oriento-Okcidento de UEA, povos baldaŭ envicigi sur siaj libro-bretoj du novajn titolojn. Numero 11 fariĝos la romantika romano de J. W. Goethe, "La suferoj de la juna Werther" en traduko de Reinhard Haupenthal kaj eldono de Ludwig Pickel. Numero 10, nun presata, estas la jam menciita Korano. Ĝi aperos, laŭ la prognozoj, ĝuste antaŭ la Universala Kongreso en Helsinko.

La Nobla Korano estas eble le plej grava verko de la monda literaturo, kiu ĝis nun mankis en la Internacia Lingvo. Ĝia apero ne povos ne doni fortan antaŭenpuŝon al la movado en islamaj kaj precipe arablingvaj landoj. Des pli granda povos esti ĝia efiko, ĉar, dank' al la avantaĝoj de ofseta presado, la Esperanta eldono enhavos, paralele kun la traduko, ankaŭ la araban originalon, laŭ la modelo de "Dia

Komedio" de Dante. Tiel ĝi povos servi samtempe por araboj, kiuj deziras perfektigi sian scion de Esperanto, kiel ankaŭ por alilingvanoj, kiuj deziras konatiĝi kun la araba.

Inda traduko

La tradukinto de Korano estas d-ro Italo Chiussi, italo loĝanta en Frankfurto kaj erudicia orientalista. El la vidpunkto de la Esperanta stilo kontrolis la tuton la prezidanto de la Akademio, prof. Waringhien; kontraŭ la araba teksto zorge kontrolis d-ro Nassif Isaac. La rezulto estas traduko maksimume fidela kaj samtempe digne elokventa, inda je la majesta originalo.

La pli ol 600-paĝa volumo prezentos rimarkindan fortostreĉon de la juna eldonejo TK kaj gravegan riĉigon de la Esperanta literaturo. Komprenante tiun gravecon, verkis por ĝi antaŭparolon Sir Muhammad Zafrulla Khan, iama prezidanto de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, nuntempe juĝisto de la Internacia Kortumo en Hago. Sir Muhammad estas samtempe monde konata fakulo pri Islamo, pri kiu li verkis libron kaj multajn apartajn studojn.

Al la Eldonejo TK, kiu kuraĝis entrepreni tiel grandan kaj gravan taskon, ni deziras plenan sukceson.

PROGRESAS P.I.V.

La eldonantoj de Plena Ilustrita Vortaro informas, ke ili ricevis sciigon de ĝia ĉefa aŭtoro, profesoro Waringhien, ke ĝis la 7-a de januaro estis kompostita jam preskaŭ la duono de la vortaro, t.e. la literoj de A ĝis la mezo de K. La volumego estas presota en Britujo. Evidente la laboro progresas kun neantaŭvidita rapideco.

Intertempe estas preparataj ankaŭ la bildotabuloj, kiuj ilustros la verkon.


Financa situacio: kuraĝiga

Laŭ SAT, la financa situacio estas tre kuraĝiga. Estis registritaj 1900 antaŭmendoj (siamtempe SAT fiksis kiel celon 2000 por povi lanĉi la eldonon). Pli ol 80 % de la antaŭmendintoj jam transsendis sian pagon al SAT aŭ al ĝiaj perantoj.

Siaflanke, la Libroservo de UEA volonte ricevos pluajn aĉetpromesojn laŭ la formulo en la artikolo en "Esperanto" de junio 1968 (sur p. 77), por tiamaniere subteni tiun kolosan entreprenon.

Victor Lebrun en Moskvo

Antaŭ nelonge ĝojigis moskvanojn vizito de Victor Lebrun, la iama sekretario de verkisto Leo Tolstoj. Invitite de la Muzeo Tolstoj en Jasnaja Poljana, la 86-jara Lebrun samtempe vizitis plurajn Esperanto-societojn. Sur la foto: s-ro Lebrun kun studentoj de la Esperanto-Societo de la Moskva Universitato.



Seminario en Köln

La plej densa programo en la historio de la Internaciaj Seminarioj de GEJ: jen frapa karakterizo de la 12-a Seminario, kiu okazis en Kolonjo de la 27-a de decembro ĝis la 3-a de januaro. La Seminario estis samtempe la 3-a en la serio sub la titolo "Esencaj trajtoj de la hodiaŭa mondo", kaj ĝi ampleksis la temon "Sociologiaj aspektoj de l' nuntempo". Prelegoj, diskuttrondoj, kursoj kaj distraĵoj sin sekvis preskaŭ seninterrompe dum la kelkaj jarfinaj tagoj.

Novajo: fonetika kurso

Unu el la plej ŝatataj programeroj, cetere nova iniciato de la nuna jaro, estis fonetika (= prononc-instrua) kurso sub la gvido de J. C. Wells, lektoro pri fonetiko en la Universitato de Londono. Abundan materialon liveris al la instruanto la prononco-manieroj de partoprenantoj el 17 landoj, inter kiuj Japanujo kaj Ĉinujo. Ankaŭ el pluraj orient-eŭropaj landoj venis nombro da seminarianoj.

La ĉefaj prelegoj estis tiuj de prof. Ivo Lapenna kaj (tri) de Peter Forster, sociologo en la Universitato de Hull, Britujo, kiu i.a. raportis pri siaj sociologiaj analizoj pri la brita Esperanto-movado.

La informa efiko de la Seminario estis granda: intervjuis la radio-servoj brita, itala kaj dana kaj televido kaj radio germanaj. Unu el la intervjuoj de la brita radio estis speciale direktita al Afriko.

Forpasis Newell


NEKROLOGOJ

L. N. M. NEWELL (1902-1968)

La 25-an de novembro 1968 mortis en vagonaro inter Parizo kaj Triesto la verkisto L. N. M. Newell, konata precipe kiel kunlaborinto de "Literatura Mondo". Lia kariero kombinis organizajn agadojn (oficulo de Londona Esperanto-Klubo en la 20-aj jaroj, kunorganizinto de du Universalaj Kongresoj) kun literaturaj (poemoj i.a. en "Dek du poetoj", 1934; novelaro "Bakŝiŝ", 1938; traduko de "Hamleto", 1964). Dum 5 jaroj li redaktis la revuon "International Language". Instruisto, li verkis lernolibrojn Esperantajn kaj anglajn. Loginte en multaj landoj, li en la lastaj jaroj restadis en Aŭstralio. Lia morto okazis dum kelkmonata vizito al Eŭropo.

TRYGVE HALVDAN LIE (1896-1969)

Komence de januaro mortis Trygve Lie, ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj de 1946 ĝis 1953 kaj multfoje ministro en la Norvega Registaro. Li sintenis favore al la Internacia Lingvo kaj en 1965 subskribis la konatan Proponon al Unuiĝintaj Nacioj.



LENIN KAJ

REMEMOROJ

La jaro 1970 signos la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de V. I. Lenin. Ankaŭ de post la okazaĵoj priskribitaj en la ĉi-suba artikolo pasis jam duona jarcento. Kian opinion pri la Internacia Lingvo havis Lenin? Kaj kian certecon ni povas atingi tra la nebuloj de tiom da jardekoj? La latva pioniro Ints Ĉaĉe lernis Esperanton en 1909 kaj ankoraŭ nun portas insignon, kiun donacis al li Zamenhof persone. Liajn rememorojn pri iamaj renkontiĝoj kaj kontaktoj kun Lenin ni publikigas kun la rezervo, ke la respondeco pri la enhavo restas ĉe la aŭtoro. La redakton kaj piednotojn ni dankas al Ulrich Lins.

La Oktobra Revolucio trovis min kiel klub-estron en la Konstantinova Artileria Lernejo, kiel eksterŝtatan instruiston pri geografio kaj geometrio en Petrograda Blindula Instituto kaj kiel sekretario de Petrograda Esperanto-Societo "Espero".

En la Konstantinova Artileria Lernejo, oficira lernejo por 1500 junuloj, en sia branĉo unika en tuta Ruslando, funkciis Esperanto-kursoj, kaj la plimulto de la junaj oficiroj jam estis fininta la komencan kurson. Dum la Oktobra Revolucio la kursojn gvidatajn de mi partoprenis 213 kadetoj, inter ili multaj tre elstaraj kursanoj, ekz. la studanto de la jura fakultato, Krylenko¹, kiu poste iĝis ĉefprokuroro de Sovetunio ĝis 1936, la kaŭkazano Gikia, kiu poste estris ses superajn militajn instituciojn, kaj la ŝipano de la revolucia Kronstadt, Ivanov, poste politika komisaro en la sama lernejo.

Nokte de la 22a al la 23a de oktobro 1917, laŭ la malnova stilo², mi sukcesis provizi miajn tri fidelajn disĉiplojn per civitanaj dokumentoj

kaj civila vestaĵo kaj lasis ilin sekrete foriri tra la 2 metrojn alta barilo el la artileria lernejo.

Deĉifraj problemoj

Post la Revolucio, Krylenko estis enoficigita kiel estro de la Konstantinova Artileria Lernejo, dum kies okupo estis verŝita eĉ ne unu guteto da sango. En la venonta tago oni fondis en la lernejo militistan substabon de la urbo Petrogrado. La ĝenerala revolucia substabo estis en la Instituto Smolnij sub la rekta gvidado de V.I. Lenin. Mi iĝis sekretario de la urba revolucia substabo. Oni povas facile imagi, ke ne nur ĉiutage, sed eĉ ĉiuhore mi havis interrilatojn kun la stabo en la Insti-

- 1 Nikolaj Vasiljeviĉ Krylenko (1885-1940), en 1936-1937 popolkomisaro pri justico, poste arestita.
- 2 4a/5a de novembro, laŭ la nova stilo.

Redakciano de "Agitanto", la aŭtoro regule vizitis informkunsidojn, kie parolis Lenin.

№ 1 (14)

Prezo:
unu numero kostas
75 rubl.
por eksterlando
2 respondkup

Proletarioj de ĉiuj landoj, unuiĝu!

AGITANTO

rusa-esperanta revuo

Kronstadta grupo de Sovjetlanda Esperantista Unuiĝo (S. E. U.).

Kronstadt, la 15-an de Julio 1921.

№ 1 (14)

Adreso:
Kronstadto,
Rusujo
Visokaja ul., 27,
log. 2.

НА НОВЫЙ ПУТЬ.

Окончивший свою работу Третий Ленинский к существующим условиям, Всероссийский Съезд Esperantistov не дань времени, как полагают не- тов, несомненно является новым по- которые—широкие массы России и

На помощь революционному пролетариату.

(Декларация по вопросу об основных задачах и формах советского движения России, принята ком. фракцией III Всероссийского конгресса Esperantistov).

1. В силу простоты своей конструкции. 2. В целях до образования при проф-

LA INTERNACIA LINGVO

tuto Smolnij. Lenen jam estis eksciinta, ke la sekretario de la revolucia substabo estas lerta tajpisto, kiu tajpis laŭ la blinda metodo per ĉiuj dek fingroj. Al la substabo oni sendis grandajn pakaĵojn da sekretaj cirkuleroj, kiujn oni devis urĝe multobligi kaj dissendadi al diversaj militistaj unuoj.

Mi laboras, tajpas, subite kuriero transdonas al Krylenko "tutan libron", kiun oni devas kopii en ne malpli ol 27 ekzempleroj; ĝi estas necesa por la unua kunsido de la revoluciaj komisaroj, por ke ĉiu havu po unu ekzemplero.

Evidentiĝis, ke la libro estas la Konstitucio

de V.I. Lenin. Por ke pli rapide sukcesu la transskribado, Krylenko mem sin anoncas kiel diktanto, kaj mi komencas tajpi sub diktado en kvin ekzempleroj, ĉar ni ne havis pli maldikan paperon por pliaj kopioj.

Sed ho ve: Jam post la kvara parto de la Konstitucio mia nobla diktanto ekdormas, ĉar la revoluciaj noktoj stampis per sia sigelo la homajn nervojn. Mi interrompis la skribadon, sternis makulaturon sur la plankon kaj kuŝigis mian lacan estron, por ke li ripozu. Mi daŭrigis la tajpadon sola. La partoj de la manuskriptoj estis kungluitaj: Kelkaj paragrafoj estis en



Ĉu sur tia scenejo
Lenin "anoncis sin
esperantisto",
publike proklamante,
ke "Esperanto estas
la latino de proleto"?
Ĉu fakto aŭ legendo?

Rememoroj pri Lenin

maŝinskribo, kelkaj skribitaj per virina mano, kelkaj per malfacile legebla manskribo de Lenin. El la Franca Konstitucio estis prenitaj multaj paragrafoj, kiujn Lenin mem tradukis estante en sia eksterlanda ekzilo. Jam estas tajpita la tria parto, la sesa ĉapitro, 24a, 25a, 26a kaj subite la 27a paragrafo. En la mezo mem de tiu paragrafo troviĝis unu vorto, kiun la kuraĝa tajpisto ne povis deĉifri. Mi provis veki mian ĉefan kamaradon Krylenko — li ne moviĝis.

La proverbo diras, ke la dronanto penas teniĝi eĉ ĉe pajlo. Same mi tiufoje kaptis eksterordinaran rimedon: Mi telefonis al la Instituto Smolnij. Longe mi devis kvereli kun la telefonistino; ŝi ne deziris min ligi kun la kabineto de Lenin, mi diru unue al ŝi, kia estas la bezono. Finfine mi rakontis al ŝi la historion.

Parolas Lenin. Pro granda ekscitiĝo mia koro preskaŭ ĉesas batadi. Mi priskribas al V.I. Lenin, ke Krylenko dormas en tia peza dormo, ke mi fiaskis provante lin vekti, sed en la 27a paragrafo de la Konstitucio mi renkontis unu vorton, kiun mi — ne posedante la rusan lingvon perfekte — ne povas deĉifri. Tralegi la vorton eble mi povus, sed ne komprenante la sencon de la vorto mi timas enlasi eraron. Lenin ekridetis kaj diris: "La paragrafon mi mem skribis, kaj mi scias ĝin parkere; tie devas esti *poĉina*, iniciato." Kaj tiel ankaŭ estis.

Ekde tiu momento ni — du fremduloj — iĝis proksimaj kaj konataj unu al la alia.

Lenin proponas kongreson

Honore al V.I. Lenin, fondinto de la 3a Internacio, la petrogradaĵ esperantistoj donis al sia klubo la nomon de la 3a Internacio. La klubo eldonis Esperanto-ŝlosilon (*Kljuĉ Esperanto*) en 10 000 ekzempleroj, la semajnan gazeton *Agitanto*, kiun oni presis en la presejo de la revolucia militŝiparo en Kronstadt, kaj ĉiumonatan Esperanto-revuon *Petrograda Informilo*, kiu estis presita en la presejo de la Ruslanda Akademio de Sciencoj. Kiel teknika redaktoro kaj klubestro, mi havis la okazon kaj la grandan feliĉon kaj ankaŭ la respondecan devon, ĉiun duan vendredon viziti la Instituton Smolnij, kie Lenin persone informadis ĉiujn redaktorojn kaj klubestrojn pri la plej novaj kaj aktualaj politikaj okazaĵoj, enlandaj kaj eksterlandaj. Alvenis la jaro 1918. La persona sekretario de Lenin³, la poligloto Kapitano Ernest Karloviĉ Drezen, antaŭa prezidanto de la Petrograda Esperanto-Societo "Espero", avizis min, ke por sabato, la 13an de aprilo je la 13a horo, Lenin invitas la reprezentantojn de la Societo viziti lin en la Instituto Smolnij. Ni pretiĝis je la grava vizito: La prezidanto de la Societo, Profesoro Vasilij Nikolajevič Devjatnin⁴, kaj mi, la sekretario. Vladimir Iljiĉ Lenin akceptis nin ege afable: Li forlasis sian skribotablon, venis renkonten ĝis la mezo

de la ĉambro kaj per ambaŭ manoj amike premis niajn manojn. Ĉeestis ankaŭ la komissaro por publika klerigado, Anatolij Vasiljeviĉ Lunaĉarskij⁵.

Lenin starigis al ni du gravajn demandojn: — Kiom da esperantistoj estas en Ruslando? — Per kio la esperantistoj antaŭvidas helpi al la nova soveta registaro?

V.N. Devjatnin ekmovis la ŝultrojn, ne sciante kion respondi. Mi penis savi la situacion kaj diris, ke en la vasta Ruslando dissemiĝis esperantistoj plejparte estas anoj de Esperanto-societoj kaj ke, laŭ la oficialaj statistikoj, ĝis la Oktobra Revolucio oni nombris 362 Esperanto-societojn. Lenin estis kontenta. Li diris:

"Bone. Jen kion ni faru: Oni devas kunvoki tutruslandan kongreson de la esperantistoj en Petrogrado, kaj el ĉiuj 300 pagintaj membrokotizon esperantistoj venu po unu delegito. Pri la estonta agado decidus la Esperanto-Kongreso mem."

Lenin ridetis kaj diris, ke dum la ekzilaj jaroj ankaŭ li konatiĝis kun la lingvo Esperanto. Iu el la parizaj esperantistoj estis sendinta al Lenin franclingvan Esperanto-lernolibron de Cart kaj Pagnier en 10 lecionoj⁶. Pro politikaj kaŭzoj unu fojon ankaŭ li eluzis Esperanton dum la Brusela Kongreso la 19an de junio 1914⁷.

La historio certigas al ni, ke jam en la jaro 1912 Lenin anoncis sin esperantisto, ĉar dum la 8a Tutmonda Esperanto-Kongreso en Krakovo, la 13an de aŭgusto 1912 je la 13a horo, Lenin (= Uljanov) sur la podio en Kraków Stary Teatr deklaris, ke "*Esperanto estas la latino de proleto*"⁸.

3 E. K. Drezen (1892-1937), la ĉefa marksista esperantologo (*Historio de la mondlingvo, Zamenhof, Analiza historio de Eo-movado* k.a.). Ke li estis sekretario de Lenin, ĝis nun ne estis konate; certe li estis sekretario de Kalinin (kp. *Hungara Vivo* 1/63), laborante en Centra Ekzekutiva Komitato de Sovetoj (1921-24). De 1921 gvidanto de la movado en Soveta Unio. Mortpafita en 1937.

4 V. N. Devjatnin (1862-1938), esperantisto de 1891. Ampleksa literatura agado.

5 A. V. Lunaĉarskij (1875-1933), honora prezidanto de la 6a SAT-Kongreso en Leningrado (1926).

6 Cart-Pagnier: *L'Espéranto en 10 leçons*. Paris: Hachette, 1902.

7 En la Brusela Konferenco de rusaj socialdemokratoj ĉiutendencaj, okazinta la 16an kaj 17an de julio 1914, ne partoprenis Lenin persone; lia raporto estis voĉlegita en franca lingvo.

8 Stanisław Rudnicki, lasta vivanta LKK-ano, ne povas konfirmi tiun informon (kiu devenas i.a. de Anatol Koŭ), sed taksas ĝin "tre verŝajna". Certe Lenin troviĝis en Krakovo tiutempe. Aliflanke la 13a de aŭgusto estis ekskursita tago, kaj ne okazis oficiala programero en la Teatro je la indikita horo.



HELPO AL MALSATANTOJ.

Al c'iuĵ Esperantaj organizaj'oj de c'iuĵ landoj kaj al la izolitaj geesperantistoj!

Karaj gesamideanoj!

Niajn Apud-Volgajn Regionojn vizitis terura gasto, pli terura ol epidemio, pli mortiga ol milito, pli dezertiga ol tertremo aŭ superakvego.

Tiu ĉi terura gasto estas—malsato!

Malsatas pli ol dek milionoj da loĝantoj!

Por helpo al la malsatantoj ne sufiĉas nur penoj de Regnaj Organoj, tial al la laboro alpaŝas ĉiuj Societaj fortoj de l'lando.

Al tiu 25-jara jubilea Esperanto-Kongreso en Krakovo la tiama rusa elmigrinto, advokato Vladimir Iljiĉ Uljanov, alvenis piede kune kun sia amiko, la kuracisto Hirŝ Hillerson. Tiu-tempe ili ambaŭ pasigis la sezonon en la karpata kuraĉloko Poronin (Galicio), situanta 7 verstojn for de Krakovo.

Helpo al malsatantoj

Dum la Petrograda Esperanto-Kongreso, la 3a Tutruslanda, kiun kunvoki mi havis la grandan honoron, de la 1a ĝis la 5a de junio 1921, reale ekstaris tre grava demando: Kiel ni, la esperantistoj, povus helpi al la juna soveta regno?

La delegitoj decidis: "Turni sin per amikecplena alvoko al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj al apartaj elstaraj geesperantistoj en la vasta mondo — helpi al enloĝantoj de ĉevolga regiono, kiujn trafis terura sekeco."

La enloĝantoj tie suferis grandan malsaton. Ni ellaboris la alvokon, kaj ĝin subskribis 13 elstaraj rusaj esperantistoj. Ankaŭ mia subskribo estis sur la alvoko.

Por forsendi tiun, tipografie presitan, alvokon al kapitalismaj landoj, denove mi devis turni min persone al Lenin. La rezultoj de nia komuna alvoko estis fruktodonaj kaj tre ĝojgaj, sed tio jam estas aparta ĉapitro de la Esperanto-movado⁹.

"Kiel escepto"

La trian kaj lastan fojon rilate Esperanto-aferon mi renkontiĝis kun Vladimir Iljiĉ Lenin en Kremlo la 25an de junio 1921; mi petis permeson por transporti al Latvujo mian Esperanto-bibliotekon.

La ŝtata leĝo malpermesis elveturigi librojn: Sur aparta folieto de sia notkajero Lenin skribis tre lakonajn, sed vere magiajn vortojn: "V vidje iskljuĉenija" (Kiel escepto). La folieton Lenin elŝiris el sia kajereto kaj alpinglis al mia petskribo.

Kaj mi kunprenis al Latvujo ĉiujn librojn de mia persona biblioteko en Petrogrado — 6000 volumojn pezantajn unu tunon.

Ints Ĉaĉe

⁹ Kp. L. Sosnovski: *Jarkvino de la Oktobra Revolucio*. Moskvo: SEU, 1923. Vidu ankaŭ *Nuntempa Bulgario* 3/62.

Afiŝo de D. Moor el la jaro 1921 vive esprimas la suferon de la katastrofa malsato en la apud-Volgaj regionoj de Soveta Unio en tiu periodo. La ĉi-apuda alvoko aperis en "Esperanta informilo", organo de "Petrograda Esperantista Societo Espero (protektata de l' Gubpolitprosvet)". La reago de la tutmonda Esperanto-movado estis rapida kaj efika.

EKZEMPLO URBETA

Veturante tra pluraj landoj de Eŭropo mi alvenis al turisma loko en suda Polujo por tie ĝui flosveturon sur la rivero Dunajec, inter imponaj rok-altaĵoj. Deir-punkto por tia veturo estas la simpatia urbeto Krościenko, preskaŭ perdita inter tumulto da montetoj kaj arbaroj.

Esperanto ĉie parolata

Tie, tranoktante en la urbeto 3000-persona, mi trovis tute eksterordinaran situacion. En tiu eta loĝloko parolas Esperanton la paroĥestro; lernas ĝin lia anstataŭanto; instruas ĝin la lernejestro; parolas ĝin multaj. En restoracioj, en kafejoj, sur la stratoj, ĉie mi renkontis homojn, precipe inter la gejunuloj, kiuj parolas Esperanton.


Kiel estiĝis tia fabela situacio?

Si posedas ĉiujn diplomojn

Esplorante tiun demandon mi trovis, ke pri ĉio "kulpas" unu sinjorino, denaska loĝantino de Krościenko. Aŭdinte en 1959 pri la Universala Kongreso en Varsovio, ŝi tuj decidis lerni la lingvon. Hodiaŭ ŝi posedas ĉiujn ĝis nun ekzistantajn polajn diplomojn pri Esperanto, ŝi havas 82 gelernantojn kaj regule disponas pri lerneja ĉambro por la oficiala, kvankam libervola kurso.

Kiel ŝi atingas tiajn sukcesojn?

Unuavice helpis ŝia entuziasmo, ŝia instrukapablo kaj preteco helpi la lernantojn. Sed krome certe kontribuis multon ŝia rigora sinteno en la kurso: se iu kursano ne laboras laŭ sia plena kapablo aŭ ofte forrestas, ŝi malpermesas al tiu plue partopreni la kurson. Ĉu ne tro ofte okazas, ke por reteni la malpli lernemajn kursanojn oni neglektas kaj fine perdas ankaŭ la lernemajn?



Flosveturo sur la rivero Dunajec en Polujo, en regiono konata pro sia naturbeleco, alportis la aŭtoron al urbeto Krościenko....

En Krościenko mi trovis ne nur belan riveron kaj agrablan restadejon, sed ankaŭ brilan ekzemplon pri tio, kion eĉ nur unu persono sola povas atingi, se oni laboras kun vera energio, entuziasmo kaj seriozeco. Ni kreu multajn Króścienkojn tra la mondo!

W.

En Krościenko loĝas s-ino Stanisława Majerczak. Post la 44-a Universala Kongreso en Varsovio ŝi komencis instrui Esperanton al la tuta urbeto: unue al siaj edzo, infanoj kaj parencoj, poste en lernejoj. Hodiaŭ ŝi havas 82 lernantojn, kaj floras la Lingvo Internacia en Krościenko....



Prelegoj en Svedujo pri Homaj Rajtoj

En la kadro de la agado por la Jaro de Homaj Rajtoj okazis trimonata prelegvojaĝo en la lasta parto de 1968 laŭ iniciato de Sveda Esperanto-Federacio. Juna ĉeĥa prelegistino, f-ino Iva Šmidrkalová, prelegis en Esperanto kaj gvidis kursojn de la Internacia Lingvo en multaj svedaj urboj ekde la 15-a de septembro. Ankoraŭ dum januaro kaj februaro 1969 ŝi restis en Skandinavio por gvidi ĝis la fino la komencitajn kursojn kaj por plue prelegadi en vico da lernejoj kaj societoj, kiuj ŝin invitis.

La ĉefa temo de ĉiuj prelegoj estis: la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj la kultura historio de Ĉeĥoslovakujo. En tiu historio ne mankas ekzemploj de la piedpremado de la fundamentaj homaj rajtoj, kaj tiujn ekzemplojn la prelegistino scipovis substreki.

Oie f-ino Šmidrkalová, malgraŭ sia nur 18-jara aĝo, sukcesis kateni la publikan atenton. Ĉu en elementaj, duagrada aŭ pli altaj lernejoj, ĉu en societoj de Ruĝa Kruco, ĉu en konferencoj politikaj, sindikataj kaj religiaj, ŝia flua lingvo kaj la glata funkciado de la interpretado el Esperanto en la svedan faris tre favoran impreson.




Post sukcesa prelego en Skövde, Iva Šmidrkalová diskutas kun (maldekstre) ministrino pri familiaj aferoj Camilla Odhnoff kaj (dekstre) parlamentano Yngve Persson.

Sen ia dubo, la organizo de prelegvojaĝoj, dum kiuj la publiko povas propra-orele konstati la vivantecon kaj belsonecon de Esperanto kaj ĉe la interpretanto konstati la eblecon de senhezita kaj kompleta internacia interkompreniĝo, prezentas unu el la plej efikaj rimedoj de informado, kiuj troviĝas je nia dispono. Ilia organizo estas unuavice la tasko de landaj kaj regionaj organizaĵoj, kunlabore kun la koncernaj informaj fakoj.

Dum sia vojaĝo f-ino Šmidrkalová alparolis ĉ. 6 700 personojn, precipe gejununojn. Post prelegoj kaj diskutoj en gimnazioj, la rektoroj kaj instruistoj ofte esprimis sian miron pri la perfekta praktika funkciado de la Internacia Lingvo kaj rekomendis ĝin antaŭ siaj lernantoj. Tiamaniere ĉie plifirmiĝis la prestiĝo de la lingvo.

En konferenco antaŭ 450 personoj en la urba teatro de Skövde la juna ĉeĥino prelegis samtage kiel la sveda ministro pri familiaj aferoj, s-ino Odhnoff, kaj la federacia prezidanto de la tutlanda sindikato de la ligno-industrio, s-ro Yngve Persson. Tiu lasta faris post ŝia prelego fortan alvokon al la publiko favore al Esperanto, kiun li kun pluraj aliaj svedaj parlamentanoj firme apogas.

PRI PANO KAJ PRI MONA LIZA



Skribas mag. Isaj Dratwer (Israelo):

En germana koncentrejo, dum iu dimanĉa posttagmezo libera de malfacila kaj pena laboro, ekestis diskuto. Mi esprimis la opinion, ke estas tre bedaŭrinde, ke pro la milito pereas tre gravaj historiaj kaj kulturaj valoraĵoj, kaj ke oni devus multon oferi por savi ilin de detruo. Mia kunparolanto simple rediris: se mi devus elekti aŭ aldonan porcion da pano aŭ eventualan pereon de la plej mondfama monumento de la homara kulturo, mi elektus pecon da pano...

Tiun ĉi interparolon mi rememoris, legante la artikolon de s-ro E. L. M. Wensing en unu Esperanta gazeto, titolitan "La stagnon de Esperanto ni riproĉu al ni mem". En sia artikolo s-ro Wensing skribas interalie: "ni ne plu tiom ĝoju pri la apero de la kolekto de

poeziaĵoj, ... pri Esperanto-tradukoj de verkoj de Dante aŭ de Shakespeare, sed ni koncentru nin je la adaptigo de nia lingvo al tiuj sferoj kaj kampoj de la homa vivo, kie la problemoj de la multlingveco estas plej akre sentata ĉiutage..."

S-ro Wensing forgesas, ke ĝuste la originala Esperanta literaturo kaj tradukoj de elstaraj verkoj el la monda literaturo montras la vivantecon de la Lingvo Internacia, pravas ĝian taŭgecon kaj helpas al ĝia natura disvolvo.

Ĝuste por multaj intelektuloj, gvidantoj en publika instruado, eĉ la nuntempaj sciencistoj, pri kiuj mencias s-ro Wensing, verkoj de Dante aŭ Shakespeare en la Lingvo Internacia certe estas pli frapa kaj brila pruvo pri la uzebleco de Esperanto, ol la — cetere ankaŭ bezonata — "poliglota (laŭlingva) moderna fakterminaro por la internacia komerco kaj industrio".

Tamen mi persone rezignus pri la panpeco pro Mona Liza! ...

Komentas la redaktoro:

Unu el la bazaj principoj de la Laborplano de UEA estas: "...konscie, organizite kaj PARALELE vastigi la scion kaj la praktikajn aplikojn de la lingvo en ĈIUJ SFEROJ". Iuj do okupiĝu pri sia Mona Liza, aliaj pri sia pano; ambaŭ estas gravaj.

Tamen estas vero, ke la pano iom postrestis. Estas vero, ke mankas ekvilibro inter la kultura literaturo de Esperanto, unuflanke, kaj ĝia scienca-teknika literaturo, aliflanke. Tial, ĝuste por paralele antaŭenigi la lingvon en ĉiuj sferoj, eble necesus doni pli da atento en la nuna stadio al la scienco kaj tekniko kaj — provizore — pendigi Mona Liza en angulo.

Unesteno por la amhara lingvo

Ĝis antaŭ nelonge en Etiopio ne ekzistis stenografio por la oficiala enlanda (amhara) lingvo. Lia Imperia Moŝto, Haile Selassie I, petis plurfoje, ke oni faru etiopian stenografion. La Internacia Laboroficejo, en la kadro de teknika helpo de UN, estis komisiita krei taŭgan stenografion por la amhara. Kvankam la amhara lingvo havas nenion komunan kun okcident-eŭropaj lingvoj, nek kun Esperanto (krom la fakton, ke ĝi havas multegajn prefiksojn kaj sufiksojn), la sama baza sistemo de "Universala Esperanta Stenografio" estis uzita kaj por la amhara stenografio kaj por la angla stenografio instruata en Etiopio. La lernolibroj estis eldonitaj de la Ministerio de Edukado. (Lernolibro por unesteno aperis ĉe Eldonejo Mondo, CH-8057 Zürich, kaj estas havebla en libro-servo de UEA.)

POTENCA LEVILO POR NIA MOVADO

Recenzas Andreo Albault (Francujo):

La Monda Lingvo-Problemo, socia, lingvistika, politika, jura, psikologia, ekonomika. Vol. I. N-ro 1, Sub aŭspicio de CED. Den Haag: Mouton, jan. 1969. 64 p. 24 cm.

Eminentaj kontribuantoj

Kio estas la jura pozicio de oficialaj lingvoj, la eblo lerni duan lingvon, kiel oni provis neniigi dialektojn (impresas la kvin punktoj de Rudnyckyj ĉefine), kiel kaj en kia grado franclingviĝis Flandrujo, kio estas konferencinterpretisto, kio estas la lingvoproblemo en diplomatio, jen la kelkaj detalproblemoj studataj en la nova revuo far eminentaj specialistoj, el kiuj mi nomu prof. Lapenna kaj ambasadoron Ralph L. Harry. Tri artikoloj en la angla, du en la franca kaj unu en la germana; abundaj resumoj en la Internacia tre sufiĉaj por doni precizan kaj instruon ideon pri la enhavo.

D-ro Sadler, la redaktoro, en interesa enkonduko (sed kial sen internacia resume?) ĉirkaŭskribas la taskon de la revuo. Negative? Ĝi ne zorgos "pri internaj problemoj de aparta

lingvo". Pozitive? "Politiko-lingvistiko" kaj defendo de la Homaj Rajtoj rilate al lingvo okupos relative multan lokon. Studado de problemoj metitaj de plurlingvaj landoj aŭ de internaciaj organizoj: en ili oni vole-nevole elektas unu aŭ kelkajn lingvojn; nacie oni penis detrui malpli fortajn idiomojn, internacie oni penas trudi la sian. Tiuj du niveloj, nacia kaj internacia, cetere estas strikte ligitaj, kiel Sadler rimarkigas per trafa demando: "Ĉu oni instruu en la franca (aŭ rusa, aŭ angla), ĉar scienca literaturo estas havebla en tiu lingvo, aŭ ĉu oni publikigu la esplorojn en la hebrea (aŭ hindia, aŭ araba), ĉar ĝi estas la lingvo, en kiu oni instruas en la lernejoj?"

En la ŝlosilaj pozicioj

LMLP ŝtopas breĉon en la monda scienca gazetaro. Ĝi povas fariĝi potenca levilo por nia movado — kiu sciis ĝin krei — en la ŝlosilaj pozicioj ja kunligitaj de scienco kaj politiko... Kondiĉe, ke ni interesiĝu pri ĝi kaj helpu en tio, ke ĉiuj universitataj kaj pli gravaj bibliotekoj mem abonnu.

Abonu per UEA: 25,— gld. jare; unuopa n-ro 10,— gld.

NOVA VORTARO MONDE DISTRIBUATA



J. C. Wells

Recenzas Reto Rossetti (Bristol):

The E.U.P. concise Esperanto and English dictionary, de J. C. Wells. London: English Universities Press, 1969. 419 p. 19 cm. Bd.

La fama aŭtodidakta serio *Teach yourself* portas, jam en 3-a eldono, Esperantan lernolibron, kiu estas la sola esperanta verko trovebla en ĝeneralaj librovendejoj tra Britujo. Ĉi tiu vortaro sub sama egido prestiĝas plue nian lingvon. La 9000 eroj de la Esperanto-angla parto ampleksas ĉiujn vortojn de *Plena Vortaro kaj Suplemento* kun aldonoj el aliaj gravaj novaj vortaroj. La celo estas praktika, kaj oni trovas multajn utilajn vortojn el la moderna vivo: *astro-/kosmonaŭto, duzo, huliĝano, ralio, restaŭri, telfero, terapiano, turneo k.m.a.* Troviĝas uesto ĉar plurloke uzita, sed ne ĝia malo *easto/eosto*, ĉar temas nur pri konjektaj proponoj.

Scienca metodo

Dank' al tiu realismo kaj scienca metodo, ĉi tiu vortaro tute foriras de la subjektivismo kaj angla orientiĝo, kiuj difektis ĉiun anglan-Esperantan vortaron post la eminenta verko de Millidge. Tiu forpaŝo estas definitiva, kaj ĝi donos grandan impulson al la sana evoluo de Esperanto en anglalingvaj landoj. Ĉirilate

s-ro Wells enportis signifan nombron da usonaj esprimoj.

La angla-Esperanta parto estas iom pli, ol duoblo de la alia, kaj tie la aŭtoro vaste entreprenas traduki ĉiaspecajn nociojn el ĝenerala kaj moderna sferoj. Neniam antaŭe la anglalingvanoj havis tiel riĉan lingvan instrumenton.

Granda kaj izola paŝo

La leksikologia paŝo, kiun faris Wells, estas tiel granda kaj izola, ke neeviteble li ne povis per unu fortostreĉo plenumi perfekte sian planon. Oni konstatas, ke li pruntis erarojn el la *Grand Dictionnaire* de Waringhien: *adolta* (do *adoltulino!*) anstataŭ *adolto* (sed eble iu kuraĝos ekuzi *adolo-adoliĝi!*); kaj *ĵigo* kaj *ĵipo* anstataŭ *ĝigo* kaj *ĝipo*. Kvankam Wells korektis multajn tro anglecajn tradukojn de Butler, li mem pekas plurfoje en sama direkto, ekz. ĉe *perturbi, plejdo, folkloro, garaĝo, lucida*. Diversaj liaj tradukoj el la angla estas obtuzaj kunmetaĵoj kun kelkfoja alkroĉo de -aĉ, tiu malpli stabila el la afiksoj (sed multloke li tradukas lerte kaj sprite). Sufiĉe ofte li maltrafas Esperantajn esprimojn kaj parolturnojn tute ĝenerale uzatajn. Sed ĉio tio estas natura kaj komprenebla ĉe tiel rigora pionira tasko.

Mendu ĉe UEA: 6,42 gld. + afranko 10 %.

Okulfrapa informilo

Recenzas Ulrich Lins (Kolonjo):

Het groeiend taalprobleem, de Hans Bakker, patro. Amsterdam: FEN, (1968). 28 p. Ilus. 23 cm.

Brako submergiĝas en maro — la ondoj simbolas dekelkon da lingvoj: Tiel trafe jam sur la kovrila paĝo estas aludita la temo de tiu ĉi nederlandlingva informa broŝuro: "La kreskanta lingvoproblemo" (titolo). Kie tiu problemo manifestiĝas, montras tutpaĝaj ilustraĵoj: en la butikoj, en la stacidomo, en la radio, en konferencoj ktp.

Poste reaperas la dronanta brako, nun provizita per savringo, kaj apude tri datoj: 1887 - 1905 - 1966 (apero de Esperanto, unua kongreso, 51a UK kun 4000 anoj). Sekvas elmonro de la apliko de Esperanto, denove sur po unu paĝo, en literaturo, lernejoj, scienco, industrio.

La broŝuro, tute konforma al la Principaro de Frostavallen, plenumas sian celon: okulfrape informi la nelegeman homon de l' nuntempo pri la lingvoproblemo kaj ĝia solvo.

Mendu ĉe UEA: Prezo anoncota.

Ne nur impresoj

Recenzas D. B. Gregor (Britujo):


My travels in Esperanto-land, de Kiotaro Deguti. Tr. el la japana M. Lamb. Kameoka: Oomoto, 1968. 189 p. Fotoj. 18 cm.

La aŭtoro, pranepo de la fondintino de Oomoto kaj filo de ties nuna estrino, rakontas pri vojaĝo al Usono tra pluraj eŭropaj landoj en 1963; sed li donas multe pli, ol nur vojaĝimpresojn. Ni lernas pri la No-teatro, la historio de Oomoto, judo, akupunkturo kaj (ĉar li celas ne-esperantistojn) pri Zamenhof kaj Esperanto, kaj — plej interese — pri la aŭtoro mem, kiu trovis sian vojaĝon "maltrankviliga travivaĵo" (pro "la torento de mondaj problemoj").

Severaj komentoj

La impresoj mem ne estas banalaj: severaj komentoj pri samlandanoj (popolo) kaj Bulgarujo (reĝimo; sed Coca-Cola'n ili nun havas!). Loĝado, manĝaĵo kaj transporto valoris al li 500 000 enojn (5 000 gld.); sed kopiemoj notu, ke li alportis multon interŝanĝe.

Mendu ĉe UEA: 7,20 gld., sendokostoj 10 %.



Gramatiko por kleruloj

Recenzas J. H. Sullivan (Manchester):

Esperanto, a complete grammar, de Ivy Kellerman Reed. Metuchen, N.J.: Scarecrow Press, 1968. 166 p. Ofset. 23 cm.

En "postparolo" profesoro Lewin rekomendas ĉi tiun verketon al "kolegoj en la kleraj profesioj", kaj tuj evidentiĝas, ke la tre konciza, formala prezentado multe pli taŭgas por klerulo ol por ordinarulo.

La tuta gramatiko klare kaj logike prezentiĝas en nur 73 paĝoj, kun vortaro de proksimume 600 vortoj kaj ekzemplaj frazoj plejparte bonaj. Aldono enhavas po 25 demandoj por ĉiu leciono.

Troviĝas diversaj anglismoj (ekzemple *tiam* anstataŭ *poste*) kaj pluraj eraraj formoj (inkl. *Kiel vi sanas?* anstataŭ *Kiel vi fartas?*). En la vortaro *Komenci* aperas kiel *Comenci*, sub C, sed krome mi notis nur tri preterarojn. Tajpsimila presaĵo impresas monotone.

Mendu ĉe UEA: ĉ. 18,— gld.; sendokostoj 10 %.

Maldekstre: unu el la trafikaj ilustraĵoj el la modern-aspekta informbroŝuro nederlanda de Hans Bakker



Tiel vestite konatiĝis tra pluraj kontinentoj la oomotano Kiotaro Deguti, kies vojaĝrakonton ni recenzas sur la apuda paĝo.

NOVA POEMARO DE GERALDO MATTOS

Recenzas Winfried Schumacher (Germanujo):

Ritmoj de vivo, de Geraldo Mattos. Rio de Janeiro: Kultura Kooperativo de Esperantistoj, 1968. 196 p. Ilus. 20 cm. Bd. (Libro-Klubo, n-ro 1).

Moderna aspekto de libro ne jam garantias modernan enhavon. Tiu banalaĵo validas ankaŭ por la poemaro de Geraldo Mattos, kies enhavo konsistas el grandparte tre tradiciaj ritmoj kaj formoj.

La poemaro ampleksas kvar ĉapitrojn havantajn proprajn temojn kaj ornamitajn per po unu desegnaĵo. La unua ĉapitro, "La granda falango", evidente estas dediĉita al "nia rondo" — mi citas: "... sub ĉiu verda stelo Lia koro!" ("Zamenhof", p. 15). En la sekvantaj ĉapitroj ("Vivocikloj" kaj "Agordoj") la lingvo pli kaj pli vigligas kaj koloriĝas. La poeto ŝatas prezenti per fortaj strekoj kontrastojn kiel riĉon kaj malriĉon, militon kaj pacon, vivon kaj morton.

La kulminon sendube formas la kvara ĉapitro, "Relikvoj", en kiu la poeto "flustras de karno al karno". Tie ĉi la poemformoj pli varias, eĉ unu senrima poemo aperas. Tie ĉi la aŭtoro kreas bildojn, metaforojn kaj vortojn de ĝenerala validado. Se tamen tiu ĉi ĉapitro ŝajnas iomete monotona, la kaŭzo supozeble estas la amasiĝo de la poemoj tiaj.

Finfine estas nepre vorto direnda pri la jam menciitaj kvar (tutpaĝaj) desegnaĵoj. Ili konsistas el verdaj strekoj, kaj ili estas aĉaj.

Mendu ĉe UEA: Prezo anoncota.

LASTE APERIS

"Koncizaj biografioj de jugoslaviaj esperantistoj", kompilaĵo de Marinko Gjivoje, kostas 14,40 gld. Ĝi ampleksas 342 biografietojn kun 163 bildoj. El sud-orienta Eŭropo alvenis ankaŭ: "Bulgario; Mallonga skizo" — 118 paĝojn mallonga.

Por la muzikistoj

Du novaĵoj sur la muzika kampo: disko el Pekino kaj kant-serio el Moskvo. La disko prezentas "Fortepianan muzikon 'Ruĝa Signal-lanterno' kun kantado de Pekina Opero", kaj akompanas ĝin 31-paĝa grandformata muziknota kajero. La kantado, tamen, estas hanlingva, malgraŭ la kovrila teksto Esperanta. La nova serio el Moskvo (ofsetita, kiel kutime) nomiĝas "Biblioteko de kantisto", kaj aperis ĝis nun la kajeroj 1 kaj 2, kun kantoj rusaj kaj kartvelaj. Akompane al ili alvenis broŝuro "Sippereo", enhavanta novelon kaj versaĵojn de estona verkisto Juhan Smuul. La sola alia poeziaĵo ĉi-monate estas duguldena ilustrita broŝureto "En frua majmateno" kun subtitolo "Kelkaj perloj el la mezepoka nederlanda poezio". Tradukis-eldonis Wouter Pilger.

Finfine! Aperis "Parnasa Gvidlibro"

Jam du-tri jarojn reklamata, la renoma "Parnasa Gvidlibro" de Kalocsay/Waringhien reaperis en Polujo en plene reviziita eldono, kiu aldonas al la pra-aŭtoroj ankaŭ la nomon de Roger Bernard. La prezo: 5,75 gld. Aliaj novaĵoj sur la pri-Esperanta kampo: La unua fasko da slipoj el la nova "Slipara vortaro" de Rüdiger Eichholz (abonebla ĉe la aŭtoro) kaj dua eldono de la japanlingva "Dua gvidlibro de interparolado Esperanta" de Hukuta masao.

Kiel kontraŭpezo al la daŭranta fluo da politikaj broŝuroj el Pekino (nur 4 ĉi-monate) H. Maschler kompilis kaj eldonis en Tel Aviv 80-paĝan anekdotaron politikan "La necenzurita humoro". Ĝi kostas 3,20 gld.

Mendojn de novaj eldonaĵoj oni bv. adresi al la Libroservo de UEA. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki prezon en guldenoj. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj.

LOKE - FAKE - PERSONE



Talento multfaceta estas tiu de la kasisto de Unuiĝo Franca por Esperanto, s-ro Jack-André Rousseau. Ekster siaj profesiaj kaj kasistaj devoj li trovas tempon por ofici kiel fakdelegito pri filatelo kaj pri amatora teatro. Jen kiel li aperis, pugn-al-zone, kun Jean Thierry en la filmo "Angoroj". (Vidu: Filatelo)

PERSONE

Balkányi

- La 11-an de marto festos sian 75-jaran datrevenon la hungara pioniro Paŭlo Balkányi, iama ĉefdelegito de UEA.

Mortis la redaktoro de Nederlanda Esperantisto

NEKROLOGOJ

HENDRIK GROENDIJK

En "Nederlanda Esperantisto" de decembro 1968 ĝia redaktoro, s-ro H. Groendijk, komunikis: "Tiu ĉi estas la lasta numero, kiun mi redaktis". Nome, ekde 1969 aperas unu "Komuna Esperanto-Gazeto" de ĉiuj nederlandaj Esperanto-organizaĵoj. Sed la vortoj montriĝis funebre profetaj: la 22-an de decembro Hendrik Groendijk forpasis post mallonga malsano, 49-jara. Li estis membro de UEA de post 1953, fakdelegito pri literaturo de post 1957.

OSKAR H. E. PETERS (1886-1968)

Mortis la 10-an de decembro 1968 en Hamburgo s-ro Oskar Peters, malnova membro de UEA kaj aktivulo de la loka movado. Li lernis la lingvon jam en 1904.

LOKE

Britujo

- Lastatempa raporto de brita socisankara organizaĵo evidentigis, ke el la 200 000 ĝis 250 000 orient-eŭropanoj loĝantaj en Britujo multaj estas "intense solecaj pro la lingva problemo". Ĝi lanĉas kampanjon por kontaktigi ilin kun interpretistoj.

Filipinoj

- Kiam la franca kaj germana registaroj lastatempe proponis subvencii la instruadon de la franca kaj germana en filipina universitato, ĝi respondis, ke pli urĝas instrui la lingvojn de "grandaj kaj gravaj proksimaj landoj" kiel Japanujo, Ĉinujo kaj Indonezio, ol tiujn de "malgrandaj kaj malproksimaj ŝtatoj".

Germanujo

- La gazeto "Vereintes Europa" ekde n-ro 3/4 de 1968 aperigas Esperanto-kurson, verkitan de Georg Müller.

Hungarujo

- Internacian ekspozicion de infandeseĝnaĵoj je la temo "La ludo" organizos Hungara Esperanto-Asocio (Budapest VIII., Kenyérmező u. 6) de 24 majo ĝis 15 junio 1969. Petu detalajn informojn ĉe HEA. Oni aljuĝos valorajn premiojn.

Polujo

- La Rondo de Junaj Esperantistoj de la Stata Infandomo en Gdańsk-Orunia jam la sepan fojon aranĝas internacian ekspozicion de infandeseĝnaĵoj. La unuajn ses ekspoziciojn vizitis entute 55 000 personoj.

Portugalujo

- Lastatempa mildigo de la cenzuro ebligis reekfloron de la movado, kiel atestas nombro da gazetartikoloj pri Esperanto kaj regula kroniko en la ĉefurba ĵurnalo "República".

FAKE

Biologio

- Disputo pri la lingvoj rekonotaj kiel oficialaj en la nova Eŭropa Organizaĵo por Molekula Biologio kaŭzis sesmonatan prokraston de ĝia fondiĝo, laŭ la revuo "Scientific Research".

Filatelo

- Centfoje jam aperis la regula esperantlingva rubriko de la pariza revuo "Le Monde Philatélique". Prizorgas ĝin fakdelegito de UEA s-ro J. A. Rousseau.

Religio

- Nova decido de Vatikano, datita je 16 julio 1968, multe vastigis la permeson pri uzo de Esperanto en la katolika liturgio. La decido de 1966 permesis uzon de Esperanto por iuj partoj de la Meso dum kongresoj de la katolika Esperant-movado. La nova permeso ampleksas multe pli grandan parton de la Meso kaj validas por ĉiuj kunvenoj senescepte.

Turismo

- Aperis novaj turismaj faldfolioj en Esperanto pri Vsetín (Ĉeĥoslovakujo), Vichy (Francujo) kaj Munkeno (Germanujo). Oni petu ilin rekte de la urbaj turismaj oficejoj.

LA JUNA VIVO



**Oficiala organo de TUTMONDA
ESPERANTISTA JUNULARA
ORGANIZO.**

**Respondekas: Robert Lloancy,
LJV, rue de la Marinade,
F-66-Tresserre, Francujo.**

TYRESÖ, KIE, KIO, KIAM?

Cu vi iam antaŭe aŭdis la nomon TYRESÖ? Cu eble Stockholm? Tyresö situas 17 km sude de Stockholm. Rapide kreskanta moderna antaŭurbo, ĉirkaŭata de arbaroj kaj lagoj. La enloĝantoj de Tyresö estas junaj. La meza aĝo estas 18 jaroj. Cu estas do strange, se la 25a Internacia Kongreso de TEJO okazos ĝuste en Tyresö?

Laŭdire la 25a IJK estas jubilea. Jubileo ne estas io aparte amuza. Ni vivas hodiaŭ, ne hieraŭ. Tial la temo de la kongreso estos "Junularo kaj Socio". La hodiaŭa junularo kaj la hodiaŭa socio. Matene okazos prelegoj kaj grupdiskutoj; posttagmeze, studvizitoj, sporto, banado, facilaj prelegoj, dum TEJO kunsidas; vespere, danco, amuzado kaj iom da kulturo. Ni loĝos en moderna lernejo. La kongresejo situas tuj apud ĝi. La IJK okazos de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 1969, tuj post la UK en Helsinki.

KOTIZOJ: Individuaj membroj de TEJO, sub 20 jaroj: 28 us. dol.; 20-25, 30 us. dol. Aliaj, sub 20, 31 us. dol.; 20-25, 33; pli ol 25, 39 us. dol. Kotizoj validaj ĝis la 31a de marto 1969. Post tiu dato aldonu 2 us. dol.

ADRESO: 25a IJK, Myggdalsvägen, 123, S-13500 Tyresö, Svedujo. Poŝtkonto 71 76 03.

JUBILEO DE BELGA GRUPO

Antaŭ kvin jaroj, la lan de novembro 1963, aro da gejunuloj starigis grupon en Sint-Kruis. Ĉiujare ili organizis, dum la paskaj ferioj, rapidkurson por gejunuloj, kiuj tuj poste aniĝis al la grupo. Nun post kvin-jara ekzisto ĝi nombras 40 gejunulojn.

La 31an de oktobro ili jubilee festis la naskiĝon de la junulargrupo per ekspozicio kaj balo. Ĉiokaze ili estis akceptitaj de la urbestro, kiu, en sia parolado, laŭdis la laboron kaj obstinon de la homoj jam de la komenco gvidintaj, tra ĉiuj malfacilaĵoj la ekziston de la grupo.

S-ro Jaumotte, prezidanto de Belga Esperanto-Federacio, esperantlingve salutis la ĉesantojn, gratulis la estraron kaj la tutan grupon pro la farita laboro kaj esprimis la deziron, ke la E-vivo en Sint-Kruis, dank'al aktivemaj gejunuloj, havu bonajn rezultojn kaj longan vivon. Subskriboj de la partoprenintoj en la ora libro longe memorigos la ĝojon kaj simpatian de tiu kvinjara jubileo.

BONA REZULTO EN NOVZELANDO

La junaj esperantistoj de Novzelando eldonis 20-paĝan, ilustritan libreton. Ĝiaj naŭ ĉapitroj provizas simplan legaĵon, klarigon pri diversaj punktoj de E-gramatiko, kaj ses-paĝan rakonton, kies titolo "al la savo" estas la titolo ankaŭ de la libreto. Dum la unua monato de post la presigo vendiĝis 500 ekzempleroj. Klarigoj estas anglalingvaj, ĉiuj legaĵmaterialoj en Esperanto.

La unuan fojon, televida programo pri E-temo okazis je la fino de julio 1968 en Christchurch. S-ro Donald Bruce, sekretario de gejunula E-asocio, parolis dum tri minutoj. La tuja rezulto estas, ke la novzelanda sekcio de Internacia Junulargastejo-Asocio petis informojn pri Esperanto. Gratulojn ni sendas al niaj malproksimaj junaj amikoj.

ESPERANTISTAJ LABORBRIGADOJ

La 18an de novembro, en Beograd okazis la finaj solenaĵoj de la pasintjara junulara laborarango "Novi Beograd 68". En la granda salono de la sindikata domo estis transdonitaj rekonoj al la plej bonaj el 64 laborbrigadoj, kiuj ĉijare laboris en Novi Beograd. La plej grandan rekonon "Standardo de la Respubliko" ricevis, en ĉeesto de du mil gejunuloj, ankaŭ Simo Milojević, komandanto de la sepa Internacia Esperantista Junulara Laborbrigado. La kvina EJLB, kiu laboris en la jaro 1964, estis distingita, fare de la Prezidanto de la Respubliko, per la Laborordeno kun la Arĝenta Girlando.

La sepan EJLB partoprenis 82 junaj geesperantistoj el: Bulgarujo (5), Ĉeĥoslovakujo (8), Hungarujo (4), Pollando (16) kaj el ĉiuj partoj de Jugoslavio. La brigado funkciis inter la 10a de aŭgusto kaj la 5a de septembro. Menciindas, ke "Standardo de la Respubliko" estas la plej alta publika rekono, kiun ĝis nun ricevis la jugoslavia esperantista junulara movado.

VINBERRIKOLTO EN 1969

La junuldomo en Lésignan-Corbière organizas labortendaron okaze de la vinberrikolto kaj peras por dungado ĉe bienuloj. La laboro, iom laciga sed bone pagita, komenciĝos proksimume la 15an de septembro kaj daŭros 2 aŭ 3 semajnojn. Lastjare partoprenis 100 gejunuloj el la tuta mondo, el kiuj neniu esperantisto.

Informojn petu kontraŭ respondkupono ĉe Maison des jeunes et de la culture, 11 Lezignan-Corbière (Francujo). Petu respondojn en Esperanto.

VARBU

UNIVERSITATANOJN

per la speciala informilo de UEA kaj STELO tekstoj angla, franca, hispana, germana, rusa kaj japana.

Subskriboj de 75 profesoroj.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA
(po 0,07 gld. — 0,28 st.)

DUA BULTENO PRETA

54-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Helsinki, 26 julio - 2 aŭgusto 1969

Alta Protektanto: D-ro Urho Kaleva Kekkonen, Prezidanto de Finnlando.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 6 6 januaro 1969
Dua Bulteno

Rekorde frue aperis la Dua Bulteno, kiu en kartona kovrilo kunigas faldfoliojn kun ĝeneralaj informoj kaj informoj kaj mendiloj por loĝado, ekskursoj, oficiala postkongreso en Turku kaj bankedo. La Duan Oficialan Bultenon ricevas ĉiu aliginto al la Kongreso, kune kun speciala atestilo, kiu ebligas rabaton je

aĉeto de dudirekta fervoja bileto por la vojaĝo al Helsinki.

Finna Vespero

En la Kongresa programo troviĝos aparta Finna Vespero, kiu verŝajne konsistos i.a. el finna popolmuziko, popolaj kantoj en Esperanto, kantado de laŭonoj kaj prezento de ekstraktoj el "Kalevala".

Vojaĝsako

Konvena memoraĵo pri la 54-a UK estas bel-aspekta vojaĝsako kun la Kongresa emblemo. Mendojn plenumas s-ro H. Melasniemi, Mikonkatu 4 C 67, Turku, Finnlando.

Statistiko

Ĝis la 6-a de januaro aliĝis entute 708 personoj el 33 landoj. Jen la laŭlanda analizo: Arg. 1, Aŭstral. 4, Aŭstrujo 3, Belg. 11, Braz. 2, Brit. 52, Bulg. 27, Ĉeĥ. 7, Dan. 24, Finn. 167, Franc. 75, Germ. 47, Grek. 1, Hisp. 16, Hung. 9, Isr. 2, Ital. 21, Jap. 13, Jug. 11, Kan. 6, Meks. 1, Ned. 68, Norv. 8, NovZ. 1, Pol. 16, Portug. 4, Rum. 1, Sov. 5, Sudano 1, Sved. 73, Svis. 14, UAR 2, Usono 15.

ESPERANTO EN RADIO

RADIO ROMA. Vidu detalan programon en la januara numero.

RADIO VARSOVIO. Rimarkinda estas la atingiĝo de polaj esperantistoj enkonduki tri duonhorajn programojn ĉiutage en la radiodissendoj de stacio aŭskultebla longdistance. Krome, programoj en alilandaj naciaj lingvoj ankaŭ entenas rubrikojn en Esperanto. La realigado de tio kaj ĝia estonta daŭro en la samampleksa tempo grandparte dependas de la reejoj flanke de la aŭskultantaro. Leteroj sendataj al la stacio montras tion, kio plaĉis aŭ ne plaĉis, instigas al novaj iniciatoj, do influas la enhavon kaj la formon de la disaŭdigoj; plie, tiuj leteroj estas la sola firma pruvo pri la neceso elsendi en Esperanto eĉ pli ampleksajn programojn, ol nun. Aŭskultu kaj skribu al: Pola Radio, Esperanto-programo, Varsovio, Pollando.

do. Diversfoje en la jaro estas organizataj interesaj konkursoj kun belaj premioj.

EVANGELIA PROGRAMO. Evangeliums Rundfunk, kune kun Transworld Radio, redaktas kristanajn rubrikojn diverslingve por la radiostacio Monte Carlo (princlando Monako). Dum pasinta programo, letero de aŭskultanto pri Esperanto estis favore pritraktita. Sugestoj de diverslandaj interesataj personoj pri aldono de Esperanto al la jam uzataj lingvoj povus havi sukcesan efikon. Oni skribu pri tio al: Evangeliums Rundfunk, Poŝtfako 467, 633-Wetzlar, Germanujo.

MEMORIGA KALENDARO

Februaro

15-22 Int.Skisemajno, Bischofshofen, Aŭstr.
16-22 Semajno de Internacia Amikeco
22-1/3 Dua Skisemajno, Bischofshofen, Aŭstr.

Marto

1-2 Svisa Jarkunveno en Solothurn
8 Renkontiĝo ĉe Foiro de Leipzig, Germ.
22-24 Trilanda Renkontiĝo en Montekarlo
31 Limdato de la Belartaj Konkursoj 1969
Kotizoj por UK Helsinki plialtiĝas
Limdato de kandidatigo komitatanoj B

Aprilo

4-6 Sveda Kongreso en Göteborg
4-7 Brita Kongreso en Dublin, Irlando
4-8 Franca-Germana Kongreso en Strasburg
6 Landa Konferenco ELI, Tel Aviv

Majo

1 Limdato de kandidatigo por Int. Ekzam.
3-4 Belga kaj markola kongreso, Bruĝo
17-18 Dana Kongreso en Arhus
17-23 IFEF-Kongreso en Avignon, Francujo

Junio


27-29 Kanada Kongreso en St. Catharine's

Julio

1-15 Int. ripozado, Natanja, Israelo
4-6 Int. renkontiĝo, Poděbrady, Ĉeĥ.
6-13 Baltmara Semajno, Rostock, GDR
6-13 Internacia Som. Univ., Gyula, Hung.
15-25 Int. turista kong. en Szeged, Hung.
19-26 KELI-Kongreso en Kiljava, Finnlando
20-26 Int. feriaj kursoj, e. Elsinoro
22-25 Antaŭkongresa ekskurso, laga reg.
23-25 Antaŭkongresa ekskurso, Laponujo
26-2/8 54-a UK en Helsinki

Aŭgusto

2-6 Oficiala Postkongreso en Turku
3-6 Postkongresa ekskurso al Leningrad
3-8 SAT-Kongreso en Novi Sad, Jugosl.
3-10 TEJO-Kongreso en Tyresö, Svedujo
3-24 Kulturaj semajnoj en Grésillon
3-11 Ferio-semajno en Krommenie, Nederl.
10-20 Int. Pedagogia Semin. en Szeged
24-7/9 Seminario por kursgvidantoj, Grésillon
24-30 Eŭropa ferio-semajno, Gwatt, Svisl.



Tiajn panoramojn en Leningrado povos ĝui la partoprenantoj de unu el la neoficialaj ekskursoj post la 54-a U.K. en Helsinki.

Oficiala informilo

N-ro 420, 1 januaro 1969

ELEKTO DE KOMITATANOJ B

Sekve al la informo aperinta sub la sama titolo en la januara "Esperanto" (p. 19) ni anoncas, ke la nombro de ĉefdelegitoj kaj delegitoj je la 31-a de decembro 1968 estis: 1408. Tio signifas, ke la nombro de komitatanoj B elekteblaj en 1969 estas: ses.

LA MEMBRONOMBRO 1968

Ci-sube ni publikigas la statistikon pri la nombro de membroj de UEA atingita ĝis la 31-a de decembro. Ĉar eĉ post la jarfino ankoraŭ kelkaj pagas por la pasinta jaro, definitiva statistiko aperos nur en la marta "esperanto".

Kiel vidiĝas, iomete malkreskis la nombro de individuaj membroj, dum aliflanke iom kreskis tiu de la asociaj membroj kaj ankaŭ la fina sumo. Rigardo al la nombroj en la unuopaj kategorioj montras, ke tamen kreskis la ĉefa grupo — Membroj-Abonantoj — kaj la nombro de Dumvivaj Membroj. La lastaj tri kategorioj montras, ke necesus multe pli aktiva varbado ĉe la junularo.

	1967	1968
Asociaj Membroj	24714	24853
Individuaj Membroj		
MJ	899	837
MA	4806	4824
MS	301	286
DM + D.Pat.	716	741
HM + H.Pat.	29	28
J-MJ	58	50
J-MA	194	182
MA-K	160	147
	7163	7095
	31877	31948

INTERNACIA EKZAMENA KOMISIONO

La Internacia Ekzamena Komisiono denove ekzamenos kandidatojn en Helsinki okaze de la UK. Povas esti allasita nur persono, kiu sukcese finis per diplomiĝo minimume mezgradan lernejon kaj kiu plene posedas la Internacian Lingvon. Ĉiu, kiu deziras kandidatiĝi, bonvolu sendi kiel eble plej frue (limdato la 1-a de majo) al la Sekretario de la IEK (S-ro J. C. Wells, 33 Rye Hill Park, London S.E. 15, Britujo): esperantlingvan tradukon de la diplomo pruvanta, ke la kandidato finis mezlernejon (la ĝusteco de la traduko devas esti konfirmita de kompetenta instanco) kaj ateston pri sukcese plenumita supera ekzameno de Esperanto en sia lando, aŭ alian pruvon pri

plena posedo de la lingvo. La kotizo por la ekzameno estas 7,20 gld. (28,80 steloj) aŭ egalvaloro, kaj devas esti pagita samtempe. Por kandidato, kiu pro registaraj reguloj absolute ne povas antaŭpagi la kotizon, sed kiu vere atendas ĉeesti la Kongreson, ekzistas ebleco de speciala aranĝo.


Laŭ la Regularo de IEK, sukceso en la ekzameno, devas "atesti, surbaze de rigora ekzameno, la kapablon instrui Esperanton je supera nivelo". Kandidatoj do atendu ekzamenon, kies kriterioj similas tiujn por universitata diplomo. Detala regularo kaj listo de rekomendita literaturo estas ricevebla de la Sekretario de la IEK aŭ de la C.O. de UEA.

PREMIOJ AL KOLEKTANTOJ

Ni kore dankas al ĉiuj, kiuj en la jaro 1968 kontribuis al la enspezoj de UEA per donaca sendado de poŝtmarkoj per la adreso: S-ro Peter Zacho, Amosevej 5 A, DK 2700 Brønshøj, Kopenhago, Danlando. Premiojn ni sendas al la plej bonaj kolektantoj de 1968:

1) Oomoto, Kameoka, Japanujo; 2) S-ino Rita Aagaard, Auckland, Nov-Zelando; 3) S-ro F. Micoud, Francujo; 4) D-ro S. E. Malden, Portland, Usono (Esperanto-klubo); Ges-roj Wilts-hire, Auckland, Nov-Zelando.

Ni petas daŭrigi la kolektadon por per la fruktoj de la vendado plue subteni la Asocion. Antaŭdankon al ĉiuj!



INTERNACIAJ KONKURSOJ 1968:
REZULTO

Konkurso I

Pozicio	lando	kvoto	poentoj	%
1	(1) Jugoslavio	3792	4630	122,10
2	(2) Italujo	3816	3815	99,97
3	(3) Japanujo	3829	3730	97,41
4	(4) Usono	4144	3918	94,55
5	(5) Svedujo	6415	6063	94,51
6	(6) Nederlando	5322	4915	92,35
7	(7) Danlando	2764	2520	91,17
8	(8) Britujo	6095	5390	88,43
9	(9) Belgujo	1912	1675	87,60
10	(11) Hispanujo	2919	2460	84,28
11	(10) Germanujo	6579	5530	84,06
12	(12) Francujo	7234	6017	83,18
13	(13) Svislando	1949	1590	81,58
14	(14) Finnlando	2608	2125	81,48
15	(15) Brazilo	3188	2506	78,61

Konkurso II

1	(1) Grekujo	250	407	162,80
2	(2) Israelo	488	640	131,15
3	(3) Kanado	955	1080	113,09
4	(4) Aŭstrujo	1270	1235	97,24
5	(5) Aŭstralio	1327	1214	91,48
6	(6) Sud-Afriko	250	225	90,—
7	(7) Argentino	693	593	85,57
8	(9) Norvegujo	1460	1169	80,07
9	(8) Nov-Zelando	1265	1011	79,92
10	(10) Madagaskaro	250	187	74,80
11	(11) Islando	250	175	70,—

Plej korajn gratulojn al la du venkintoj:
Jugoslavio kaj Grekujo, kiu lasta ankaŭ pasintjare gajnis premion.

La Internaciajn Konkursojn partoprenas tiuj landoj, el kiuj oni povas libere aliĝi al UEA. Poentoj estas aljuĝataj laŭ nombro de membroj, jene: AM = 1; MJ kaj J-MJ = 5; MA, MA-K kaj J-MA = 10; MS = 15; Patrono kaj DM = 50. La kvoto estas la meza poentaro atingita en la lastaj 5 jaroj. Interkrampaj ciferoj indikas la pasintmonatajn poziciojn. Laŭ la rezultoj je la 31-a de decembro la kotizperanto de la venkinta lando en ĉiu el la du konkursoj ricevas je sia dispono libropremion de 100 gld.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Generala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de aprilo neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Angolo: António José dos Santos Cadima
Aŭstralio: Doris M. Sinclair. **Brazilo:** Elmano Moreira de Carvalho. **Britujo:** Cyril Hancock, Ken Young, V. P. St. G. Kirke, J. S. Fettes.
Ĉeĥoslovakujo: Jaroslav Novák. **Finnlando:** Pekka Mäntyjärvi. **Germanujo:** L. T. N. Robel.
Hungarujo: Árpád Rátkai. **Israelo:** Mag. Anna Dratwer, Dvora Šor. **Jugoslavio:** Momčilo Krstić. **Koreujo:** Jong-Hyu Jeong.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1968)

Britujo: St. Annes-on-Sea. **Ĉeĥoslovakujo:** Bratislava (FD Medicino interna), Liberec, Piesok-Podbrezová, Vrbno. **Danlando:** Holbæk (D). **Francujo:** Aix-en-Provence (FD Studentaj aferoj), Fresnoy-le-Grand, Montpellier (FD Junulgastejoj), Nice (D). **Germanujo:** Aurich, Laupheim, Magdeburg, Röddenau. **Hispanujo:** Barcelona (FD Filatelaĵoj esperantaj, Juro), Castellon (FD Tekniko, teksa kaj radia), El Arenal. **Kanado:** Calgary, Port Washington. **Maŭritanio:** Port-Etienne. **Nederlando:** Arnhem (FD Literatura), Hardegarijp. **Portugalujo:** Aveiro. **Svedujo:** Stockholm (FD Konstruado). **Usono:** Pacific Palisades, Riverside, Wilmore.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Cool, s-ro G. F. T., Svisujo (DM-Jarlibro).
Kessler, f-ino Alice, Svisujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1969

27 Bagger, s-ro P.; 28 Bjerg-Nielsen, s-ro J.; 29 Blume, s-ro Arne; 30 Hou, s-ro C. H.; 31 Jensen, s-ro J. P.; 32 Kolle, s-ro A.; 33 Lange, s-ro Otto C.; 34 Larsen, s-ro S.; 35 Neergaard, d-ro P.; 36 Trier, s-ro B. S., Danlando. 37 Dabezies, s-ro H.; 38 Larglantier, s-ro G., Francujo. 39 Joliet, s-ro Leo; 40 Knauss, s-ro W.; 41 Wehrheim, d-ro H., Germanujo. 42 Majcenović, s-ro Mijo; 43 Torelli, s-ino Amalija, Jugoslavio. 44 Rousseau, s-ro Henri, Kameruno. 45 Archell, s-ro R. S.; 46 Henderson, s-ino D. M., Kanado. 47 Blomme, f-ino W. B. P.; 48 Kroon, s-ino A. M.; 49 Mast, s-ro J. L.; 50 Postma, f-ino Tj., Nederlando. 51 Ammann, s-ro K.; 52 De Sassi, s-ino H.; 53 Grossmann, s-ro H. W.; 54 Grutter, s-ino L., Svisujo.

DONACOJ (Gld.)

Generala Kaso: Britujo: Nenjo Rimanto, 8,87. Nederlando: Beekhuysen, s-ro B. R., 30,50; Koopmans, f-ino B. A., 5,—; Peet, s-ro Gerard M. J. B., 13,—. Svedujo: Anderson, s-ro G., 17,50. Svisujo: Rehmann, s-ro Alfred, 20,—.

Patrono A de TEJO: Britujo: Parson, f-ino E. L. Germanujo: Franck, f-ino H. Nederlando: Moerbeek, s-ro R.

Fondaĵo Enkiklopedio de Esperanto: Germanujo: Murath, s-ro M., 9,45; Wehrheim, d-ro, 49,50.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Nederlando: Sadler, d-ro V., 25,—.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Universala Esperanto-Asocio

DANKON !

Kiel ĉiujare, tiel ankaŭ fine de 1968 atingis la Centran Oficejon en Rotterdam kaj la oficejon de CED en Londono granda nombro da salutoj kaj bondeziroj el ĉiuj partoj de la mondo. Ne povante respondi al ĉiuj unuope, ni per tiuj ĉi linioj plej kore dankas al la sendintoj kaj reciprokas la bondezirojn por feliĉiga kaj progresiga nova jaro. Samtempe ni aparte dankas al la multaj personoj, kiuj afable gratulis al UEA okaze de ĝia 60-jara datreveno en 1968.

ANONCETOJ

Tarifo: 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Vitalis Maria, 17-jara, eklernis Esperanton en septembro 1967 kaj serĉas korespondantojn. Kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn kaj diskojn. Vitalis Maria, Sf. Gheorghe, str. Budai N.A. 48, Jud. Covasna, Rumanujo.



Lung Fung Trading Co., G.P.O. Box 15747, Hong Kong, (1) ĉiam servas al vi, se vi volas aĉeti ion ajn el Hong Kong, (2) ĉiam servas al vi, se vi volas vojaĝi al Hong Kong, (3) serĉas kunlaborantojn tutmonde por organizi internacian komercan servon. Tre bona servo! Tre favora prezo! Bonvolu enketi kaj proponi!

Krommenie. 17-a Internacia Esperantista Ferio-Semajno, 3-11 aŭgusto 1969. Ni prezentos belan programon kun ekskursoj ĉiutage. La kosto estas nur 100,— gld. Informojn kaj aliĝilojn sendos al vi la sekretario: J. A. v. d. Meulen-v. Harten, Popelstraat 13, Krommenie, Nederlando. La partopreno estas limigita. La limdato por la aliĝoj: majo 1969 (bonvolu aldoni int. rpk.)

Kontraŭ poŝtmarkoj pri astronomio mi sendos al vi poŝtmarkojn laŭ viaj temoj. André Heck, 36, rue Haut-Vinâve, Jalhay, Belgujo.

Cu vi kolektas Esperanto-Slosilojn en diversaj lingvoj? La Biblioteko de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2) disponas kvanton da malnovaj Slosiloj diverslingvaj por interŝanĝo aŭ vendo. Prezo: po 1,— gld. ink. afrankon.

Komencantinoj 16-jaraj deziras korespondi kun gestudentoj prefere el Aŭstrujo, Germanujo, Italujo. Esperanta klubo Lycée classique Dullague, 34 Béziers, Francujo.



*Komencantinoj
16-jaraj en
Béziers, Franc.*

Kun okcidentaj kaj ekstereŭropaj landoj volas korespondi, interŝanĝi pk, fotojn, prospektojn ktp. 24-jara agrikultura teknikisto. Interesiĝas pri geografio, ĝardenkulturo, sporto kaj aliaj temoj. Volontege kun agrikulturistoj. Stanislav Karés, Polst cp 47, okrec Jicin, Ĉeĥoslovakujo.

20-jara studento deziras korespondi pri ĉiu temo, speciale kun gejunuloj el Finnlando sed havas grandan intereson pri ĉiuj skandinavaj landoj. Ladislav Kovar, u. Kostelicka, Ceska Trebova, Ĉeĥoslovakujo.

"Insulo de la rozoj": per 2, 5, 8 respondkuponoj riceveblaj: foto, poŝt(glu)marko, unuataga koverto. I-47037 Rimini, S-Bernardino, 26, Italujo.

De s-ino Haudebine al siaj amikoj kaj konatoj. Post longa malsano mi denove aktiviĝas kaj ĝojus ricevi novaĵojn de vi. Al multaj mi, ja, sendis cirkuleron komence de la jaro. Al ĉiuj mi sendas nun miajn plej korajn bondezirojn okaze de la nova jaro. Estu feliĉaj!

M. Haudebine

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA, (2427 Padstow Cres., Clarkson, Ont., Kanado), povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi, kontraŭ 1 respondkupono, kompletan liston de siaj programoj.

La Poŝtmark-kolektado daŭras. Propono: sendu poŝtfreŝajn seriojn de via lando. Tiaj ofte havas pli da valoro, ol tio, kion vi mem pagis por ili. Sendu daŭre al Peter Zacho (por UEA), Amosevej 5 A, Kopenhago Brh., Danlando.

KORESPONDEMULOJ !

Se vi publikigos korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian FOTON. Ĉiunmonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por **SENPAĜA** aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

H. C. ANDERSEN

" F A B E L O J "

(1-a volumo)

Traduko de D-ro L. L. Zamenhof

53 originalaj ilustraĵoj de A. Uniechowski

238-paĝa eleganta eldono kun trikolora ŝirmkovrilo.
Ĉiu ekzemplero entenas rabatkuponon validan por
aĉeto de la eldonota 2-a volumo.

Sendante al sia libroservo la rabatkuponon enteni-
tan en la 4-a volumo de "Fabeloj" oni ricevos
rabaton de 0,30 us. \$.

Prezo: 3 us. \$ (+ 10% por sendokostoj)



Liveras la naciaj libro-servoj kaj la Libro-Servo de UEA

Eldonis: "Heroldo de Esperanto", 13 rue de la Reinette-Pippelingstr., Bruselo 1

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 48 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 18 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

jarabono: \$ 4,50 (62 steloj)

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: **13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1**

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

Jus aperis:

ENKONDUKO en la LIBRO-SCIENCON de ESPERANTO

de Reinhard Haupenthal

Bibliografia gvidilo kun komentario.

Formato 13,5 x 21 cm, 44 p., Prezo 3,50 GM

Mendu ĉe


Ludwig Pickel, eldonejo, Postfach 2113,
D-85 Nürnberg 2, Germanujo aŭ UEA.

Abonu al

la Praktiko

"la gazeto kiu instruas kaj amuzas"

unesteno



Universala Esperanta Stenografio.
Lernolibro por instrui sin mem
aperis sub la aŭspicioj de UEA kaj
de EKI.

(prezo: gld. 17.75 = 71 steloj).

Mondo, Rothstr. 7, CH-8057 Zürich.

Helsingör

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj de la venonta somero okazos **20.-26. de julio** en **La internacia Altlernejo** de Helsingör. Venu por ĝui belan feriosemajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj
Danlando

NB. Speciala karavano el Helsingör al **UK en Helsinko** estos aranĝita. Ekiro 26/7 matene, alveno al Helsinko tagmeze.

Burleska — maldeca — satira

LA SKURILA LIBRO

Amuza mikspoto da legindaĵoj por ĉiaj gustoj verkita en Esperanto de

Adolf Sproeck

100 paĝoj kun plurkolora plasta kovrilo.
Prezo 6,— gld. aŭ 13,— danaj kronoj
ĉe Libroservo de UEA aŭ ĉe la eldonejo
Torben Kehlet, Ystadvej 11, DK-2850 Naerum.
Girkonto Danlando 7 95 58.




Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Miĥail Lermontov, la granda majstro de la rusa prozo, UEA eldonis ĉi tiujn elstarajn rakontojn en la traduko de D. Staritsky.

Kun bibliografio
de Lermontovaj
verkoj en
Esperanto

Moderna plasta
kovrilo

Prezo: 5,— gld.



Per plumo samtempe ekscita, kortuŝa, ironia kaj senspirige poezia, la aŭtoro vojaĝigas nin kun juna rusa oficiro, laca pri la vivo kaj kroĉiganta al la iluzia feliĉo de fortaj sensaĵoj.

Por vi

Grupoj, familioj, izoluloj, kiuj revas pri belaj ferioj, en plej turista franca regiono "Val de Loire"

La Esperantista Kulturdomo

Kastelo "GRESILLON" - 49 - BAUGÉ - Francujo estos malfermita por - laŭ eblecoj - pli, malpli longaj someraj restadoj.

Konsilindaj estas la oficialaj periodoj de nia programo:

En Februaro: 16/2 - 23/2 kaj 23/2 - 2/3

Seminario por kurs- kaj grup- gvidantoj
(se estas sufiĉe da partoprenantoj)

En Aprilo: 1/4 - 12/4

Rektmetoda kurso de esperanto - Praktikado de la lingvo.

Dum la somero:

29/6 - 13/7: Esperantaj Studoj.

La franca lingvo per esperanto.

13/7 - 20/7: Oka Kultura Semajno de U.F.E.

20/7 - 3/8: Kulturaj kaj Turismaj Internaciaj Ferioj.

3/8 - 24/8: Kulturaj Esperantistaj Semajnoj.

24/8 - 7/9: Esperanto-kurso.

Seminario por kurs- kaj grup- gvidantoj.

EKSKURSOJ al la kasteloj de la Loire, Angers, Nantes, Le Mans, la nokta spektaklo de la kastelo Le Lude, k.t.p.

Tuj petu informojn je la ĉi-supra adreso.